# *Raúl Castro kaj Miguel Díaz-Canel oma?as la martirojn de Moncada*




Havano, jul 26 (RHK) La generalo de armeo, Raúl Castro; la prezidento Miguel Díaz-Canel; la prezidanto de la ?tata konsilantaro, Esteban Lazo,  kaj la kuba popolo sendis florbukedojn al Ma?zoleo de la martiroj de la 26-a de julio de 1953, en la tombeja hereda?o Sankta Ifigenia en la urbo Santiago de Kubo.

Per solena ceremonio oni deponis la florbukedojn, kie partoprenis la Komandanto de la Revolucio, Ramiro Valdés, kaj Lázaro Expósito kaj Beatriz Johnson, prezidanto kaj vicprezidantino de la provinca defenda konsilataro, respektive.

Sekve, anta? la ?tonego, monumento funebra, kiu gardas la cindrojn de la gvidanto Fidel Castro, kiu komandis la historian sturmon al kazerno Moncada,  estis deponitaj la florbukedoj.

Image not found or type unknown

florbukedo en la tombo de Fidel Castro

Oni anka? deponis florbukedojn anta? la tomboj de la nacia heroo de Kubo, José Martí, de la Patro de la Patrolando, Carlos Manuel de Céspedes kaj la Patrino de ?iuj kubanoj, Mariana Grajales.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/229671-raul-castro-kaj-miguel-diaz-canel-omagas-la-martirojn-de-moncada

# Radio Habana Cuba